

Martin Gotthard Schneider,  
Vivojn sep mi volus havi

*tradukita de Adolf Burkhardt*

Vivojn sep mi volus havi.  
Kia beno, kia riĉ'!  
Tio por deziroj ĉiuj  
estus rava plenumiĝ'.  
La unuan mi eluzus,  
sxip-stiristo, kapitan',  
por la vastan mondon vidi,  
veli sur la ocean'.

En la dua vivo min en  
cirko kovrus klaŭna vest',  
kaj admirus ĉiuj min, dre-  
siston de sovaĝa best'.  
En la tria, politike  
estus mi tre grava hom',  
ĉiutage inter Moskvo  
flugus kaj la Blanka Dom'.

Film-stelulo, kanzonisto  
estus mi en vivo kvar;  
ŝikajn aŭtojn, belajn inojn  
mi posedus sen avar'.  
Kaj por helpi la homaron,  
en la kvina vivo mi  
estus kuracisto fama  
en tre alta pozici'.

Sesa vivo: ĉio nuna  
estis nura bagatel'.  
Kosmonaŭto mi fariĝos,  
flugos inter lun' kaj stel'.  
En la sepa vivo - nu, mi  
kio povus esti plu?  
Certe venos la ideo,  
speciala, sen tabu'.

...

Vivojn sep mi volus havi.  
Mi ricevis unu por  
sole tiun ĉi travivi,  
antaŭ ol ĝi flugis for.  
Tiu unu, mia, nun, kun  
ĝojo, trist', plezuro, dev' -  
ke ĝi estu bona vivo -  
jen sincera mia rev'.

*Traduko de la Germana poemo "Sieben Leben möcht ich haben" de MARTIN GOTTHARD SCHNEIDER (\*1930-04-26) en Esperanton de ADOLF BURKHARDT (pastro, \*1929-04-10 - †2004-04-02).*

*Arg-962-1939 (2014-01-10 18:35:57)*

*Pri la tradukinto vidu la retejon [http://de.wikipedia.org/wiki/Adolf\\_Burkhardt](http://de.wikipedia.org/wiki/Adolf_Burkhardt).*